



BEATRIJS

Mezepoka Nederlanda Maria-legendo, tradukita de Gerrit Berveling





Verkado ete enspezigas.
 Oni konsilas ke mi çesu,
 la cerbon per ĝi ne elçerpu.
 Sed pro la gracoplen' de tiu,
 kiu patrin' kaj virga restis,
 mi entreprenis çì miraklon,
 sen dub' de Dio plenumitan
 por laŭdi Ŝin kiu Lin nutris.

10 **M**i ekas jen pri monaĥino
 poemon. Donu al mi Dio,
 ke mi la kernon trafe diru
 kaj ke mi bonan finon verku,
 precize laŭ la okazaĵoj,
 kiujn rakontis frato Ghijsbrecht,
 enklostriĝinta Vilhelmano.
 Li trovis ĝin en siaj libroj,
 li estis aĝa, saĝa homo.

20 **L**a monaĥin', pri kiu temas,
aristokratis, distingita,
ne eblus trovi plu eĉ iun
al ŝi similan, timas mi,
laŭ moroj kaj laŭ sinprezento.
Se mi prilaŭdus ŝiajn membrojn,
elnombrus ĉiujn la belecojn,
mi timas, ke ĝi ne tre decus.
Rakontos mi do, kiun taskon
ŝi havis longan tempon en
la klostro de sia vokiĝo:
'stis sakristiano ŝi.
30 Pri tio mi certigas vin.
Nek lantis ŝi nek lacis ŝi,
nek nokte nek ĉe taglabor';
ŝi tuj plenumis ĉiujn taskojn;
ŝi sonorigis en preĝejo,
zorgis pri lumo, pri ornamo,
kaj vekis ĉiujn monaĥinojn.

Ĉi nobelino ne sen amo
restis. Amo kutimas verki
miraĵojn ĉie en la mondo.
40 Foje de ĝi devenas honto,
sufer', ĉagreno kaj envio;
foje devenas ĝojo, bono.
Eĉ saĝajn faras stultaj ĝi,
ke ili restu en malĝoj',
ĉu vole aŭ ĉu kontraŭvole.
Ĝi tiom kelkajn konfuzigas,
ke ili dubas pri parol' aŭ
pri silent': kio ja utilis?
Plurajn terenĵetegas ĝi,
50 kiu ekstaras mem laŭplaĉe.
Malavarigas amo tiajn,
kiuj prefere tenus l' aĵojn:
sed tamen amo disipigas.

Troviĝas krome homfidelo:
al ili, kion donas amo,
ĉio ĉi estas ja komuna:
abundo, ĝojo aŭ ĉagreno.
Ĉi amon nomas mi fidinda.
Ne ĉion povas mi elnombri,
60 ĉar en la rojoj de la amo
'stas tiom da terur' kaj bono!
Tial oni ne tro imputu
la monaĥinon, ke ŝin amo
ekkaptis forte, seneskape;
klopodas daŭre la diablo
por tenti l' homon: frue, tarde,
tagon kaj nokton, siajn eblojn
li eluzas senintermite.
Per falsaj ruzoj li forlogis
70 efike ŝin al karna peko:
la monaĥin' ektimis morti.

Dion ŝi preĝis kaj petegis,
ke Li per sia grac' ŝin savu.
Ŝi diris: "Min afliktas tiom,
kaj vundas, ho! la forta amo,
- ĝin scias Tiu, kiu ĉion
scias: nenio eskapas Lin -
ke ĉi sufer' min igas vagi.
Mi devos vivi novan vivon:
80 monaĥan veston lasos mi."

Nun aŭdu kio do okazis.
Al la junulo, kiun ege
ŝi amis, sendis ŝi personon
leterportantan tre afable:
Li venu tuj, kiam nur eblos,
profite estos ja por li.
Trovis leterportist' la knabon.
Leteron prenis, legis li,

senditan de la amikino.
90 Li estis ĝoja en la kor’;
rapidis do por esti tie.
Depost la aĝo dek-du-jara,
ĉi ambaŭ amo estris jam,
do multe ili jam suferis.

Rajdis plejeble baldaŭ li
monahinejen, serĉi ŝin.
Eksidis li antaŭ l’ fenestro,
kaj sian dolĉan – lasu do –
li petis vidi kaj alvoĉi.
100 Ne daŭris longe, venis ŝi.
Vizitis ŝi lin ĉe l’ fenestro,
kiu el stangoj feraj estis
plektita en la kruca form’.
Kiom ofte ili suspiris,
ekstere li, ŝi malekstere,
forte regate de la amo!
Kaj tiel longe ili sidis,
ke mi ne povus vin sciigi
pri ĉiu ŝanĝiĝ’ de l’ aspekto.

110 “**V**e mi” – ŝi diris ofte – “Ve mi!
Karega, mi malgajas tre;
nur unu-du parolojn diru,
fortigu mian koron vi.
Konsolon vian mi bezonas.
Ama sago trafis la koron,
doloron grandan sentas mi;
neniam plu mi povos ridi,
se vi, karul’, ĝin ne eltirus.”

Respondis li jen kun fervoro:
120 “Vi bone scias, dolĉa kara,
ke longe jam toleris ni
ĉi amon, dum la tuta viv’;

neniam trovis ni kvieton
por unufoje kisi nin.
Estrin' Venera, la Diino,
kiu estigis tiun senton,
al Dio estu abomena,
ĉar igas Ŝi du florojn belajn
forvelki kaj putriĝi tiel.

130 Ho, povu mi de vi elpeti,
formeti veston monaĥinan!
Momenton diru vi senriskan,
por ke mi elkonduku vin:
Mi rajdus for, mi tuj preparus
pri vestoj, kostaj, kaj el lan',
per peltoj mi subŝtofus ilin:
mantelo, robo, pluvvestaĵo.
Pro nul danĝer' mi lasos vin!
Kun vi mi pretas ja alfronti
140 acidan, dolĉan: tutan vivon.
Je Dio, parol' de honoro!"

La junulino diris: "Kara,
volonte mi akceptas tion,
mi kun vi iros tiel foren,
ke scios nul ĉimonaĥeje,
kien ni estos vojaĝintaj.
De ĉi vespero post ok tagoj
revenu kaj atendu min
ekstere tie, fruktarbeje.
150 Vi staru sub eglanterio.
Atendu min; elvenos mi,
mi estos via novedzino,
mi sekvos vin kien vi volas;
se ne malsano min retenos
nek io malebligos paŝi,
mi nepre tien al vi venos:
do viaflanke, mi vin petas,
vi zorgu esti tie, kara."

Tiel interkonsentis ili.

160 **F**orpaŝis li al la ĉevalo,
kiu selite lin atendis.
Li enseliĝis tre rapide
kaj rajdis for en hasta trot'
tra la kamparo, al la urbo.
Li ne forgesis sian karan:
la postan tagon en la urbo
li serĉis bluan kaj skarlatan,
kaj tajlorigis el ĉi ŝtofoj
mantelon por ŝi kun kapuĉ',
170 kaj robon kaj eĉ pluvvestaĵon,
kaj ĉion bone subŝtofita!
Neniam oni vidis pelton
pli bonan kiel subŝtofaĵon.
Ĝin laŭdis ĉiuj ĝin vidantaj.
Tranĉilon, zonon kaj monujon
aĉetis li, bonajn kaj kostajn,
harligojn, kaj el oro ringojn,
kaj ĉiuspecajn ornamaĵojn.
Li informiĝis pri ornamoj,
180 kiujn bezonas novedzin'.
Kaj kvincent pundojn li kunprenis,
kaj li forrajdis ekvespere
ekster la urbon, tre diskrete.
Kaj ĉiujn ĉi ornamojn li
sur la ĉevalo zorge portis,
kaj tiel iris al la klostro.
Laŭ ŝia diro, fruktarbeje,
li tie sub eglanterio
eksidis en la mola herbo,
190 atendi ĝis la kara venos.

Pri li ne nun mi plurakontos,
prefere pri la belulin'.
Ŝi sonorigis matutininon.

La amo suferigis ŝin.
Post kiam kantis matutinojn
la monaĥinoj junaj, oldaj,
kiuj loĝadis en la klostro,
post kiam ĉiuj returniĝis
200 ŝi sola restis en ĥorejo
kaj diris tie siajn preĝojn
kiel ŝi ĝis tiam kutimis.
Antaŭ l' altar' ŝi genuiĝis,
kaj diris kun tre granda zorgo:

“**M**aria, panjo, kara nomo,
nun mia korpo ne toleras
plu porti monaĥinan veston.
Vi funde konas ĉiuhore
la homan koron, homajn ecojn.
210 Ho kiom fastis mi kaj preĝis,
ho kiom mi punbatis min:
sed vana estis ĉiu peno.
Min terenĵetis nun la amo,
mi do obeos nun la mondon.
Samvere, dolĉa Estro, kiel
Vi pendis inter du rabistoj,
tordita sur la ligno kruca,
samkiel Vi Lazaron vokis
kiu mortinta kuŝis tombe,
220 samtiel mian zorgon vidu,
kaj mian krimon Vi pardonu;
en egaj pekoj mortos mi.”

Poste ŝi iris de l' ĥorejo
al statueto, kie ŝi
surgenuiĝis, kaj preĝadis,
ĉar tie staris ja Maria.
Sentime ŝi Marian vokis:

230 “**M**i tage-nokte lamentadis
ĉe Vi plorinde pri l’ dolor’,
sed tio tute ne min helpis.
Mi plene perdus la prudenton,
se portus mi plu ĉi vestaĵojn!”

Ŝi sin senigis de la froko,
kaj metis sur Mari-altaron.
Ankaŭ demetis ŝi la ŝuojn.

240 **N**un aŭdu, kion faras ŝi!
Ŝlosilojn de la sakristio
ŝi ĉe l’ Mari-statu’ pendigis.
Kaj jen mi donas la klarigon,
kial ŝi tien metis ilin:
por ke, se oni je la primo
ilin bezonus, eblu trovi;
ĉar ĉiuhore decas ja,
pasante la Mari-statuon,
ke oni alrigardas ĝin
por diri “Ave” antaŭ paso:
“Ave, Maria”; - tial do
ŝi la ŝlosilojn tien metis.

250 **Ŝ**i do foriris, povrulin’,
vestita en ĉemizo nura,
kaj kie konis pordon ŝi,
ŝi ĝin malŝlosis ege ruze,
nerimarkite elŝteliĝis,
kviete kaj sen ajna bru’.
Ŝi time venis fruktarbejon.
Rimarkis ŝin jam la junulo,
kaj diris: “Kara, ne plu timu,
amikon jen vi vidas ĉi.”

Kaj kiam ambaŭ renkontiĝis,
260 ŝi jam ekhontis antaŭ li,
vestite ja nur en ĉemizo,
kun kapo nuda kaj sen ŝuoj.
Li diris: “Bela ho virino,
vin nepre decus multe pli
vestaĵoj belaj, bonaj roboj.
Pro tio ne kulpigu min:
mi ilin donos al vi baldaŭ.”
Kaj tie sub l’ eglanterio
li donis al ŝi laŭbezone
270 ĉion, je ŝia plensufiĉ’.
Po du li donis la vestaĵojn:
’stis blua, kion ŝi surmetis,
plej bonfarita tajloriĵo.
Alridis ŝin afable li.
Li diris: “Kara, ĉielblua
konvenas pli ol griza vin.”
Kaj ŝi surmetis ŝtrumpoparon,
kaj krome du Kordovajn ŝuojn,
kiuj al ŝi pli harmoniis
280 ol iam la sandalligiĵoj.
El blanka silko kapkovrilon
li tiutage donis plu,
kaj ŝi ĝin metis sur la kapon.
Kaj tiam kisis la junulo
amplene ŝin sur ŝia buŝo.
Lin ŝajnis ke tagiĝas jam,
ĉar tiel brilis ŝia belo.

Li haste paŝis al ĉevalo.
Li antaŭ si ŝin enseligis.
290 Kaj tiel ambaŭ rajdis for,
tiel for, ke tagiĝis jam,
neniu ilin persekutis.

Tiam eklumis oriente.

Ŝi diris: “Di’, ĉies konsolo,
bonvolu Vi protekti nin!

Matenon vidas mi eklumi;

se ne forkurus mi kun vi,

mi sonorigus nun por primo,

kiel antaŭe mi kutimis

300 en la plej pia monaĥejo.

Mi timas, ke pri l’ fuĝ’ mi pentos:

malofte nur la mond’ fidelas,

kvankam mi turnis min al ĝi;

vendiston ruzan ĝi similas,

kiu komercas brilorajon

anstataŭ ringojn vere orajn.”

“**V**e, kion diras vi, belega!

Se iam ajn mi vin forlasos,

min devos Dio akre puni!

310 Ni povos rajdi kien ajn:

pro nul danĝer’ mi lasos vin,

disigos nin nur aĉa morto!

Kiel vi povas pri mi dubi?

Neniam vi rimarkis pri mi,

ke mi ‘stas fia aŭ malfida.

Post ol mi vin elektis mia,

mi ne plu havis eĉ ekpenson,

pri Imperiestrino eĉ!

Se mi eĉ estus je ŝi inda,

320 kara, mi ne forlasus vin!

Pri tio vi ja povas certi.

Mi kvincent pundojn bonkvalitajn

kunportas da arĝento pura;

vi, kara, tiujn sola estros.

Se eĉ ni rajdos eksterlanden,

nenion devos ni lombardi,

almenaŭ ne dum jaroj sep.”

Tiel do trote ili rajdis
matene ĝis arbara rando.
330 La birdoj tie havis feston.
Sonoron tian ili faris,
ke ĉie oni aŭdis tion.
Ĉiu sianature kantis.
Kaj belaj floroj tie staris
larĝpetalaj sur verda kampo,
belegaj estis, bonodoraj.
L' aero estis klara, pura.
Multaj 'stis tie rektaj arboj,
riĉornamitaj foliare.

340 **L**a belan la junul' rigardis:
li daŭre tiom amis ŝin.
Li diris: "Kara, se vin plaĉas,
ni elseliĝos, plukos florojn.
Ĉi tie al mi ŝajnas bele.
De l' amo ludu ni la ludon."

"**H**o fi!" - ŝi diris - "Vilaĝano!
Ĉu mi descendu sur la grundon
kiel ulino, kiu monon
akiras fie per la korpo?
350 Min nepre mankus decosento!
Neniam tion dirus vi,
se vi ne estus sovaĝulo.
Ho prave mi bedaŭron sentas!
Vin punu Dio pro ĉi plano.
Ne plu menciu tiun temon,
aŭskultu l' birdojn en la valoj,
kiel plenĝoje ili kantas;
ĉi tempopaso ne malplaĉos.
Kiam mi estos tute nuda
360 kun vi en bonfarita lito,
vi tiam agu laŭdezire,
kiel al via koro plaĉas.

Mi vin koleras en la koro,
ĉar vi proponis tion nun.”

Li diris: “Kara, ne koleru,
Venera ja instigis min.
Min Dio punu kaj hontigu,
se iam ajn mi ekus ree.”

Ŝi diris: “Do pardonas mi.
370 Vi min konsolas pli ol iu
vivanta sub la ĉieltrono.
Se vivus Abŝalom la bela,
kaj se mi certus, ke kun li
mi povus vivi eĉ mil jarojn
en riĉo kaj en kvieteco,
- min tio kontentigus ne!
Kara, mi tiom amas vin,
ne havus sencon eĉ proponi,
ke iam mi forgesus vin.
380 Se mi eĉ loĝus en ĉielo,
dum vi surtere vivus plu,
mi nepre venus al vi tie!
Ho Dio, Vi pardonu, ke
parolojn mi vortigis stultajn!
Plej eta ĝojo enĉiela
valoras pli ol tera ĝoj’:
plej eta tie plenperfektas,
l’ animon homan plej delectas
kapablo, daŭre ami Dion.
390 Ĉio surtera nur mizeras.
Plene neniom ĝi valoras
kompare kun ĉiela aĵo.
Alstrebas tion kiuj saĝas,
kvankam mi mem ja devas vagi
kaj vivi en pekeco granda
pro vi, junulo bela kara.”

400 **I**nterparolis ili tiel,
rajdante tra montar' kaj valoj.
Ne eblas plendetale diri,
kio okazis inter ambaŭ.

Do tiel ili pluvojaĝis
kaj trafis certan urbon, kiu
situis bele en iu valo.
Kaj tiom ilin plaĉis tie,
ke restis ili jarojn sep,
kaj ili ĝuis luksan vivon
plezure kun la korpa ĝu',
kaj naskis du infanojn kune.

410 **S**ed tiam, post ĉi jaroj sep,
post kiam foruziĝis mono,
lombardi ili devis multe
kion kun si kunportis ili.
Ornamojn, vestojn kaj ĉevalon
por prez' duona ili vendis
kaj ĉiun monon tuj elspezis.
Sed tiam kion ili faru?
Ŝi ne kapablis eĉ nur ŝpini
por perlabori la vivtenon.
420 Altiĝis prezoj en la lando
pri manĝoj, vino kaj biero,
pri ĉio kion hom' bezonas;
do multe ili ĉagreniĝis.
Prefere ili mortus tuj
ol almozpeti pri la pano.
Disiĝon kaŭzis ĉi malriĉo,
kvankam bedaŭris tion ambaŭ.
La viro perdis la fidelon:
li lasis ŝin en ega peno,

returniĝante mem hejmlanden.
430 Neniam ŝi plu vidis lin.
Restadis tie apud ŝi: la
infanoj du treege belaj.

Ŝi diris: “Tiel do okazis,
kiel mi timis jam delonge.
Postrestas kun ĉagreno mi:
ĉar tiu min forlasis nun,
je kiu ĉiam fidis mi.
Maria, ho Estrin’, bonvole
preĝu por mi kaj miaj idoj,
440 ke ni ne mortu pro malsato.
Kion mi faru, povrulin’!
Mi devas korpon kaj animon
makuli do per pekaj faroj.
Estrin’ Maria, helpu min!
Eĉ se mi nun kapablus ŝpini,
per tio mi ne perlaborus
en du semajnoj unu panon.
Pro ĉi mizero mi do devas
ekster la urbo sur kampar’
450 per propra korpo monakiri,
por ke manĝaĵon mi aĉetu.
Ĉar kiel ajn, ne povas mi
infanojn miajn ja malzorgi.”

Ĉi tiel ŝi ekvivis peke,
ĉar al ni jen certigas oni,
ke ŝi sep longajn jarojn vivis
surtere tiel, laŭ putino.
Plenumis ŝi multnombrajn pekojn
- kvankam kun pleja senplezur’ -
460 kiujn ŝi faris per la korpo,
per kiu ŝi ne multe ĝuis.
Kaj ĉion ĉi por eta sumo,
per kiu l’ idojn ŝi vivtenis.

Ja ne utilis ĉion diri:
hontindajn pekojn kaj penadon,
faritajn dum ĉi dek kvar jaroj!
Sed preterlasis ŝi neniam,
ĉu plora ŝi ĉu eĉ ĉagrena,
ke ĉiutage kun fidelo
470 sepfoje preĝu ŝi Marian;
La Horojn preĝis ŝi, honore
kaj laŭde, pete ke Maria
ŝin liberigu el la pekoj,
kiuj sur ŝi ja tiom pezis
dum ĉiuj tiuj dek kvar jaroj.

Ĉar al vi jen certigas mi:
sep jarojn estis ŝi kun l' ulo,
kiu generis l' idojn du
kaj ŝin postlasis eksterlande
480 kie mizeron ŝi suferis.
Vi scias jam pri l' dua sep.

Do aŭdu, kiel plu ŝi vivis.

Finiĝis do la dek kvar jaroj,
jen Dio sendis en la koron
al ŝi pentemon tiel grandan,
ke si prefere lasus tranĉi
la kapon for per nuda glav',
ol plue fari tiajn pekojn
per sia korpo, laŭ kutimo.
490 Ŝi ploris tage, ploris nokte,
l' okuloj ne sekiĝis plu.
Ŝi diris: "Ho Maria, kiu
mamnutris Dion, ho Fontan',
ne plu toleru ĉi suferojn!
Estrin', mi prenas Vin ateste,
ke pentas mi pri miaj pekoj,
ke ili min ĉagrenas tre.

Tiel multnombros, ke mi scias
ne plu, kie mi pekis kaj
500 kun kiu. Ve! Kompatu min!
Mi prave timas Lastan Juĝon
- ne vidas mi, kion Di' vidas -
ĉar ĉiuj pekoj malkovriĝos
- ĉu riĉa kulpas ĉu povrul' -
kaj ĉiun krimon Dio venĝos,
pri kiu oni ne konfesis
antaŭe jam kun pentofaro;
ja certe, tion scias mi!
Do tial ege timas mi.
510 Se portus mi eĉ haran veston,
kaj rampus kvazaŭ kvarpieda
en ĝi de lando mi al lando,
vestite lane, kaj sen ŝuoj,
mi tamen ne povus akiri,
de l' pekoj liberiĝi, sen,
Estrin' Maria, helpo via!
Fontano super ĉiu virto,
jam multajn feliĉigis Vi:
pruviĝis ĝi ĉe Teofilo.
520 Li estis unu ĉefpekulo,
fordonis al diablo sin:
l' animon samkiel la vivon,
li estis plene ties sklavo;
tamen, Estrin', Vi savis lin.
Kvankam mi estas pekulino,
kaj plej mizera fiulin',
vivante jene kontraŭvole,
Estrin', memoru, ke mi preĝis
la preĝojn por honori Vin.
530 Al mi la kompatemon montru.
Mi estas unu, kiu zorgas:
bezonas vian helpon mi.
Pro tio rajtu mi kuraĝi:
ke ĉiu, nobla Virgulin',

kiu tagtage Vin salutas
«Ave Maria», dankon trovu.
Kiuj volonte al Vi preĝas,
tiuj povas certiĝi, ke
de ĝi al ili venos savo:
540 Estrino, tiel plaĉas Vin,
ho favorata Di-edzino!
Vin salutigis via Filo
en Nazaret, kie Vin serĉis
l' anĝelo kun mesaĝ' unika,
kiu antaŭe ne aŭdiĝis;
tial precize ĉi esprimoj
sendube al Vi tiom karas,
ke estas danko Vi al ĉiu,
kiu per ili vokas Vin;
550 se pekojn implikiĝus li,
ankoraŭ Vi lin gracplenigus
kaj ĉe la Filo por li pledus.”

Ĉi preĝon kaj ĉi plendajn vortojn
la pekulin' tagtage diris.
Ŝi prenis mane po infano,
vagadis tra la tuta lando
de urb' al urbo en malriĉo,
vivante de almozpetad'.
Ŝi tiom longe plue vagis,
560 ĝis ŝi denove l' klostron trovis,
kie ŝi estis monaĥino;
post sun' je vesperiĝo venis
ŝi tarde ĉe vidvina dom',
noktŝirmon petis ŝi pro Dio,
ke tie ŝi la nokton restu.
“Mi ja ne povas vin forpeli”
diris vidvin', “kun ĉi infanoj;
aspektas ili, ŝajne, lacaj.

Ripozu do, eksidu vi.
570 Ni inter ni dividos ĉion,
kion provizis la Sinjor',
pro am' de lia dolĉa Panjo."

Do restis ŝi kun la infanoj,
kaj tre volonte informiĝis,
kiel en klostro statas ĉio.
"Rakontu" - petis ŝi - "vi bona,
ĉu klostro 'stas de nobelinoj?"
"Ho jes" - ŝi diris - "je l' honoro!
kaj luksa ĝi kaj ege riĉa;
580 neniŭ klostro ĝin similas.
La monaĥinoj tie ene -
neniam aŭdis mi eĉ famon
pri iu ajn malbonon diri,
pri kiu ili povus honti."

Kaj kiu sidis ĉe l' infanoj,
ŝi diris: "Kial tiel diri?
Ankoraŭ tiun ĉi semajnon
pri monaĥino aŭdis mi;
se bone mi komprenis ĉion,
590 'stis sakristiano ŝi.
Ĝin diris viro, sen mensogo.
Okazis antaŭ dek kvar jaroj,
ke ŝi forfuĝis el la klostro;
neniam pri ŝi diskoniĝis,
en kiu lok' ekloĝis ŝi."

Kaj koleriĝis la vidvino
kaj diris: "Klare vi deliras!
Ne diru plu tiajn rakontojn
pri l' sakristiano, nepre -
600 aŭ tie ĉi ne restos vi!
'stas sakristiano ŝi
jam pli ol dek kvar jarojn nun,

neniam oni vidis manki
en unu matutino ŝin,
krom foje kiam ŝi malsanis.
Ol hundo multe pli malbonus,
kiu rakontus krom bonaĵon.
Animon ŝi havas tiel puran,
indan je ĉiu monaĥino.

610 Eĉ traserĉante ĉiujn klostrojn
inter la Elbo kaj Garono,
mi vetas ke ne eblos trovi
eĉ unu kun pli sankta viv'!"

Ŝi kiu tiel longe vivis
en pekoj, trovis stranga tion.
Ŝi diris: "Sinjorin', sciigu,
ŝiajn gepatrojn nomu do!"
Ŝi diris ambaŭ laŭ la nomoj.
Jam sciis ŝi: jen tio - ŝi.

620 **H**o Dio, tiun nokton ploris
ŝi kaŝe antaŭ sia lito.
Ŝi diris: "Mi prezentas sole
plenkoran egan penton nur:
Estrin' Maria, venu helpi!
Ho pikas miaj pekoj min!
Se vidus mi varmegan fornon,
en kiu brulus tia ardo,
ke flamoj lekus ĝiajn lipojn,
mi enŝteliĝus tre rapide,
630 se ĝi kvitigus miajn kulpojn.
Ho Di', desperon Vi malamas:
mi fidas tiun ĉi malamon.
Mi daŭre plu esperas gracon,
kvankam pro tim' angoras mi;
ĝi min kondukas en timegon.
Neniam tia pekulino
ekzistis post la Enkarniĝo,

kiam sur teron venis Vi
por morti sur la kruca ligno,
640 - aŭ savis Vi la pekulinon:
kiu kun pento serĉis gracon,
ĝin trovis, eĉ se estis tarde,
ĉar tiel Vi jam klare montris
ĉe unu el la du rabistoj,
la dekstra kiu pendis kruce;
ja estas tio nin konsola,
ke lin akceptis Vi senpune.
Riparas ĉion bona pento;
tion rimarkas mi ĉe tio;
650 Vi diris: "Estos vi, amiko,
hodiaŭ kun Mi en la Regno;
pri tio Mi certigas vin."
Montriĝis, ho Sinjor', klarege,
ke Gisemasto, la murdint',
finfine Vin pri graco petis.
Nek donis oron li nek riĉon,
li sole pentis pri la pekoj.
Vian kompaton povas homo
mezuri same senprobleme,
660 kiel facilas unutage
elĉerpi maron ĝis sekec'.
Do ne ekzistas tia peko,
Estrin', ke ĝin ne venkus grac'.
Ho kial min do ne atingus
via kompato, se la pekojn
mi ja bedaŭras tiom forte?"

Surplanke kuŝis ŝi preĝante,
dormemo kaptis ŝiajn membrojn
kaj dolĉe ŝi en dorm' forglitis.
670 Al ŝi vizio jen aperis,
ke voĉo klara vokas ŝin
kuŝantan tie kaj dormantan:

“**H**omo, vi tiel longe plendis,
pri vi Maria nun kompatas:
Ŝi savis vin per siaj preĝoj.
Nun iru klostren tre rapide:
la pordoj staras larĝ-apertaj,
samhore vi la samajn pasis
kun la junulo, via kara,
680 kiu vin lasis en mizero.
Retrovos vi monaĥajn vestojn
kuŝantaj ree sur l’ artaro;
vualon, frokon kaj la ŝuojn
surmetu do trankvile vi.
Marian danku pro ĉi ĉio.
Ŝlosilojn de la sakristio,
kiujn vi ĉe l’ statu’ pendigis
la nokton, kiam vi foriris,
Ŝi tiel zorgoplene gardis,
690 ke ĉiujn tiujn dek kvar jarojn
neniu eĉ rimarkis mankon,
foreston vian eĉ ne vidis.
Maria estas vin amika:
Ŝi ĉiam servis viavice
en pli-malpli via aspekto.
La Sinjorino de l’ ĉielo
ĝin faris, pekulin’, por vi!
Ŝi nun revokas vin al klostro.
Neniu kuŝas vialite.
700 Mi diras laŭ ordon’ de Dio.”

Ne daŭris longe post ĉi tio,
ŝi saltleviĝis el la dorm’.
Ŝi diris: “Dio ĉiopova,
neniam al diablo lasu,
ke li min puŝos en ĉagrenon
pli ol suferis mi ĝis nun!
Se nun mi iros en la klostron
kaj oni prenos min ŝtelisto,

710 skandalo iĝos eĉ pli granda
ol ĉe l' forkuro el la klostro.
Mi petas Vin, ho Dio bona,
je via multmerita sango,
kiu forgutis el la Flanko,
se tiu voĉ' kiu min vokis,
ĉi tien venis nur por bono,
ke ĝi ĉe unu foj' ne lasu,
ke duan fojon venu ĝi
kaj trian fojon, tre tre klare,
por ke mi kun certeco iru
720 denove re en mian klostron.
Mi benos Vin pro tio ĉi,
Marian ĉiam laŭdos mi."

La postan nokton, aŭdu vi,
alpaŝis ŝin denove voĉo,
kiu alvokis ŝin kaj diris:
"Homo, prokrastas vi tro longe!
Do iru re en vian klostron.
Konsolo via estas Dio;
do faru laŭ Mari-ordono!
730 Mi 'stas sendito ŝia: kredu!"

Do duan fojon ŝi perceptis
voĉon kiu alvenis ŝin,
instigan ke ŝi iru klostren.
Nek tamen ŝi aŭdacis fari.
La trian nokton ŝi atendis
kaj diris: "Se 'stas elfa monstro,
kiu aperis antaŭ mi,
do ke mi baldaŭ neniigu
diablan forton kaj potencon;
740 kaj se li venos en ĉi nokto,
Sinjor', lin tiom Vi konfuzu,
ke li forfuĝu el ĉi dom',
ke li al mi neniom nocu.

Maria, estu nun apude,
se al mi voĉon sendas Vi,
por ke mi iru en la klostron.
Estrin', je via Ido petas
mi, ke Vi trian fojon sendu."

750 **L**a trian nokton ŝi maldormis.
El Dia forto venis voĉo
kun supergranda lumhelec'
kaj diris: "Tute ja ne taŭgas,
ke vi ne agas laŭ l' ordono,
ĉar per mi vin Maria vokas.
Ho vi atendu ne tro longe!
Nun iru klostron vi sen dubo.
La pordoj staras larĝ-apertaj:
vi povos paŝi laŭ elekto.
760 Retrovos vi monaĥajn vestojn
kuŝantaj ree sur l' altaro."

Kiam la voĉo tion diris,
ne povis pekulin' kuŝanta
ĉi brilon per l' okul' toleri.
Ŝi diris: "Nun mi ne plu dubu:
ĉi voĉo venas ja de Dio,
ĝi estas de Mari' sendito.
Nun certas mi sen ajna dubo:
ĝin akompanas hela brilo.
Do nun mi ne prokrastos plu,
770 mi iros re en mian klostron.
Mi faros ĝin kun bona fido
kaj per la ŝirmo de Maria,
kaj ambaŭ miajn idojn ĉi
konfidos mi al Patro Dio;
Li nepre ilin save ŝparos."

Demetis ŝi, sen plu hezito,
la vestojn, kiuj kovris ŝin,
senbrue por ne vekti ilin.
780 Ŝi ambaŭ kisis sur la buŝon,
ŝi diris: “Karaj, restu sanaj.
Sub ŝirmo de Maria dolĉa
mi lasas vin en bona fido;
se Ŝi por mi ne grac-akiris,
mi nepre ne forlasus vin,
eĉ ne pro ĉiu riĉ’ de Romo!”

Nun aŭdu kion ŝi komencis!
Nun iris ŝi kun multaj larmoj
ek al la klostro, tute sola.
Kiam ŝi venis fruktarbejen,
790 la pordojn trovis ŝi apertaj.
Enpaŝis ŝi sen plua dubo:
“Maria, kiom dankas mi!
Mi estas re inter la muroj!
Bonŝancon donu Dio plu!”
Laŭ kie paŝis ŝi, la pordojn
larĝe apertaj trovis ŝi.
Kaj la preĝejon ŝi eniris.
Kaj tie kaŝe diris ŝi:
800 “Ho Sinjor’ Di’, mi petas Vin,
helpu pri ĉi monaĥa vesto,
kiun mi antaŭ dek kvar jaroj
kuŝigis sur Mari-altaro,
la nokton, kiam fuĝis mi.”

Mi tion nepre ne mensogas,
mi diras ĝin tre serioze:
la ŝuojn, frokon kaj vualon
ŝi trovis, kie lasis ŝi,
ekzakte je la sama loko.

810 Surmetis ŝi tre haste ilin
kaj diris: “Dio de ĉielo
kaj ho Maria, Virgulino
dolĉa, benata ĉiam estu!
Vi estas flor’ de l’ virtoj.
En via pura virgineco
Vi portis Idon sen dolor’,
kiu Sinjor’ eterne estos.
Vi estas elektita: kreis
ĉielon, teron, via Filo.
De Dio venas tiu povo
820 kiun Vi ade povos uzi:
Sinjoron, kiu al ni fratas,
ordoni povas Panjo Vi,
kaj Filin’ kara Li Vin nomas.
Tre tio trankviligas min:
kiu ĉe Vi petas pri graco,
ĝin trovas, eĉ se estas tarde.
Apogo via ege bonas.
Estante trista kaj malgaja
– ĉe Vi ja statas tiel ĉi –
830 pro Vi mi rajtas esti ĝoja.
Kun pravo mi benadas Vin!”

Ŝlosilojn de la sakristio
ŝi vidis pendi – estas vere! –
kie ŝi lasis, ĉe Maria.
Ŝlosilojn do ŝi prenis kun si
kaj iris al ĥorejo, kie
lampoj ŝi vidis ĉie brili.
Post tio prenis ŝi la librojn,
dismetis tiujn laŭ sidlokoj,
840 kiel antaŭe ŝi kutimis,
Marian Virgulinon preĝis,
ke tiu savu el malbono
ŝin kaj l’ infanojn, kiujn lasis
ŝi en ĉagren’ ĉe l’ vidva hejmo.

Kun tio pasis jam la nokto,
kaj eksonoris la horloĝ',
kiu indikis noktomezon.
Ŝi sonoriloŝnuron prenis
por plej ekzakta matutino,
850 kaj ĉirkaŭaĵe ĉiuj aŭdis.
Kiuj dormeje supre kuŝis,
descendis ĉiuj sen malfru'
de la dormej'. Pri l' okazaĵoj
nek sciis granda nek malgranda.

Tutvive restis ŝi enklostre
sen riproĉindo, sen skandal':
Maria anstataŭis ŝin
precize kvazaŭ estus ŝi mem.
Tiel ĉi pekulin' revenis,
860 dank' al Maria, laŭdu Ŝin,
la Virgulinon de l' ĉielo,
kiu senfine kun fidelo
siajn amikojn asistadas,
se tiujn ĝenas la mizer'.

La nobelino de l' rakonto
'stas monaĥin' kiel antaŭe.

Mi tamen volas ne forgesi
ambaŭ infanojn, kiujn lasis
ŝi en mizer' ĉe l' vidva hejmo
870 kun mank' de mono, mank' de pano.
Ne eblas plene elrakonti,
kiam la panjo estis for,
kiom da larmoj ili verŝis.

Eksidis la vidvin' apude;
kompatis ege ilin ŝi.
Ŝi diris: "Al la abatino
ĉi du infanojn prenos mi.

Dio instigu ŝian koron,
por ke ilin bonfaru ŝi.”

880 **Ŝ**i vestis ilin, laĉis ŝuojn,
kunprenis ilin al la klostro;
ŝi diris: “Sinjorin’, do vidu
mizeron de ĉi orfoj du:
la panjo ilin en la nokto
timplene lasis miadome
kaj mem foriris sian vojon,
ne scias mi pri la direkt’.
Senhelpaj estas ĉi infanoj.
Mi mem ne scias, kion fari.”

890 **L**a abatino ŝin respondis:
“Vi tenu ilin, pagos mi,
por ke vi ne malriĉon havu,
ja viahejme ili loĝas.
Pro Dio, ĉiutage oni
por ili zorgos karitate.
Do ĉiutage iu venu
akcepti trinkon kaj manĝaĵon.
Kaj se ‘stas manko, diru ĝin.”

900 **K**aj tre gajiĝis la vidvino,
ke jen solviĝis ĉio ĉi.
Ŝi prenis ĉe si la infanojn
kaj bone ilin vartis ŝi.

La panjo ilin mamnutrinta,
kiu pri ili multe penis,
sin sentis ja senpezigita,
sciante ke ŝi ilin vartas,
la idojn kiujn ŝi forlasis
kun granda timo kaj dolor’.
Ŝi do estonte ne plu zorgis
910 nek timis plu pro la infanoj.

Ŝi vivis nur sanktulan vivon.
Multajn suferojn, multajn ĝemojn
ŝi havis tage kaj dumnokte,
ĉar en la koro kuŝis pento
pri ŝiaj fiaj pekoj, kiujn
ŝi ne kuraĝis ekrakonti
al iu homo, nek malkovri,
eĉ ne poeme sur paper'.

920 **P**ost tio venis iun tagon
abato, kiu ĉiujare
ilin vizitis unufoje,
por informiĝi ĉu ĉi tie
estiĝis famo pri malbon',
kiu damaĝus al la klostro.

930 **L**a tagon, kiam li alvenis,
kuŝante preĝis sian preĝon
en la ĥorej' la pekulino
en ege granda kormalcerto.
Diablo tentis, ke pro honto
sian tre nekutiman pekon
ŝi ne malkovru al l' abato.

Kuŝante tiel en preĝado,
ŝi vidis, kiel apud ŝi
junulo paŝas blankvestita;
enbrake li videble portis
infanon, ŝajne mortis ĝi.
Suprenĵetadis la junulo
pomon, kiun li kaptis re:
por la infan' ĝi estis ludo.

940 **L**a monaĥino vidis ĉion
tre klare, kuŝe en preĝado.

Ŝi diris: “Ho amik’, bonvolu,
se do de Dio venis vi,
je liaj Diroj mi vin petas,
ke vi eldiru kaj ne kaŝu,
kial vi ludas por l’ infano
per tiu bela ruĝa pom’:
enbrake kuŝas morta ĝi.
Utilas via ludo ĝin ne.”

950 **V**i pravas, monaĥino, certe:
ne scias ĝi pri mia ludo,
nek multe ja, nek eĉ malmulte;
ĝi mortis, – aŭdas, vidas ne.
Precize same Di’ nescias,
ke preĝas vi, ke fastas vi;
ĝi tute ne efikas iom;
perdita estas tiu peno,
sencele vi punbatas vin;
de pekoj tiom vi kovriĝis,
960 ke Dio supre en ĉiel’
neniom aŭdas el ĉi preĝoj.
Do jen konsil’: rapidu, ek!
Al la abat’, la patro, iru,
kaj rakontadu al li plene,
sen ajn mensogo, ĉiujn pekojn.
Ne erarigu vin diablo.
Pekliberigos la abato
vin el ĉi pekoj vin ĝenantaj.
Sed se vi ilin ne konfesos,
970 pri ili venĝos akre Di’!”

Kaj malaperis la junulo,
nenion plu al ŝi malkovris.
Sed kion diris li, ŝi kaptis.

Tial matene ege frue
ŝi petis la abaton, ke li

ŝian konfeson plenan aŭdu.
Kaj saĝa estis la abato.
Li diris: “Ho filino kara,
volonte tion faros mi.
980 Bone pripensu, primeditu
unue ĉiujn pekojn do.”

Kaj ŝi je sama ĉi momento
sidiĝis ĉe l’ abato sankta,
malkovris lin pri l’ tuta vivo
kaj ties vojo de l’ komenc’:
kiel ŝin unu stulta amo
nemezureble tentis, kaj
kiel ŝi devis forkuŝigi
monaĥan veston, ho kun tim’!,
990 dumnokte sur Mari-altaro,
por fuĝi l’ klostron kun junulo,
kiu generis du infanojn.

Pri ĉio kion ŝi travivis,
nenion ŝi menciis ne;
ĉion, kion ŝi sciis kore,
rakontis al abato ŝi.

Post konfesado tute funda,
diris sankta patro, l’ abat’:
“Filino, mi pekliberigos
1000 vin de la pekoj vin ĝenantaj,
kiujn al mi konfesis vi.
Benata kaj honoregata
estu de Dio la Patrino!”

Ĉe tio li la manon metis
al ŝi sur kap’, absolvis ŝin.

Li diris: “En predik’ publike
vian konfeson diros mi,
mi tiel zorge ĝin vortigos,
ke vi kaj viaj idoj ne
1010 el ĝi, en kiu ajn ĉirkaŭo,
ekhavos ĝenojn, aŭ problemon.
Ja estus fie, ĝin silenti,
tiun miraklon, kiun Dio
faris honore al la Panjo.
Mi ĝin disdiros ĉie ajn.
Esperas mi, ke konvertiĝos
pluraj pekuloj pro ĉi tio,
honore al Madono dolĉa.”

Al klostranaro li sciigis,
1020 antaŭ ol rehejmiĝis li,
kion ĉi monaĥin’ travivis;
tamen neniu sciis, pri
kiu temas; restis sekrete.

L’ abat’ foriris, Di-gvidate.
Ambaŭ idojn de l’ monaĥino
kondukis kun si la abat’.
Li vestis ilin per frok’ griza,
fariĝis ili du bonuloj.

Ĉi panjo estis Beatrijs.

Nun laŭdu Dion. Lin honoru,
Marian ankaŭ, Di-nutrintan,
kiu miraklon verkis belan.
Ŝi savis ŝin el la mizero.

Ni ĉiuj preĝu, grandaj, etaj,
aŭdante legi ĉi miraklon,
por ke Maria por ni estu
porpetantino en la valo,
kie la mondon juĝos Dio.

Amen!

